



Amika

Revuo

(édition provisoire)

* L'Espéranto rapproche les peuples du monde entier *

Organe Officiel de
L'INSTITUT CONGOLAIS D'ESPERANTO
(A.S.B.L.)

Rédaction - Administration
B.P. 7579 - KINSHASA 1.
(Congo)

S O M M A I R E

E N H A V O

- Subtenu la movadon en Kongo.
- Qu'est-ce que l'Institut Congolais d'Espéranto ?
- Per Esperanto la homoj iĝas unu.
- Amikaj vortoj.
- La graveco de la maljunuloj.
- L'Espéranto dans le monde.
- Idées du Dr. Zamenhof.
- Deziras korespondi.
- K.E.I. - komunikoj.

La Estraro de Konga Esperanto-Instituto :

Louis NGINGI , Prezidanto ;
Paul NZEMBA-PAKU , Vic-Prezidanto ;
Karel BRAET , Generala Sekretario ;
David SALAMBI , Administranto ;
Alphonse TSHIBALA , Administranto ;
Joseph NKWANGI , Administranto ;

D E M A N D A S

AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ LOĜANTAJ EN EVOLUINTAJ LANDOJ SUBTENON . . .

Kiamaniere pozitive subteni nian movadon en Kongo ?

S u b t e n e pagi , laŭ viaj financaj eblecoj , kotizon al :

U.E.A. , Nieuwe Binnenweg 176 , ROTTERDAM , Nederlando.

(nepre menciu kun via pago : "subteno al Konga Esperanto-Instituto")

(nepre sendu al K.E.I. sciigon pri via donaco !)

Tielmaniere vi helpos la Esperanto-movadon en Kongo e k z i s t i . . .

La amikoj kiuj donacas minimume : 2 Usonoaj Dolaroj

aŭ 8,5 D.M.

aŭ 10 francaj frankoj

aŭ 100 belgaj frankoj

aŭ 28 steloj

ricevas dum unu jaro nian revuon kaj aliajn publikaĵojn.

*

Ĉ u v i s c i a s ? Se ni havus 4000 stelojn je nia konto ĉe U.E.A.

ni povus sendi kongan delegiton al la Universala Kongreso 1967 en

TEL-AVIV . . . Ĉu vere nur revo ?

*

A première vue, cette question semble superflue. Pourtant, elle est posée parce que beaucoup de congolais, étudiant la Langue Internationale, semblent souvent confondre l'Institut avec un groupe local, voire avec l'organisation d'un cours . . . Pour éclairer les esprits, voici en bref la signification de l'Institut Congolais d'Espéranto.

Des cours d'Espéranto ayant débuté en 1963 à LIMETE (Kinshasa), quelques étudiants émirent le voeu de créer une association groupant les espérantistes vivant au Congo. C'est ainsi qu'en mai 1964 fut créé l'Institut Congolais d'Espéranto, association sans but lucratif, ouvert à tous les espérantistes vivant au Congo. Par ses Statuts, l'Institut est une association qui se situe uniquement sur le plan n a t i o n a l . Cela signifie donc que cette association ne doit pas se confondre ni avec un groupe local, ni avec un cours ou une série de cours donnés en un lieu déterminé du pays.

Chaque espérantiste, isolé ou membre d'un groupe local, ou inscrit comme élève dans un cours donné dans n'importe quel lieu de la République, peut donc devenir membre à part entière de l'Institut Congolais d'Espéranto, à condition naturellement de payer sa cotisation annuelle et de respecter les Statuts.

Comment se présente actuellement la situation en ce qui concerne l'association nationale ? L'I.C.E. a des membres isolés, un club espérantiste (celui de ST,JEAN (Kinshasa) a adhéré en tant que groupe local. L'idéal serait naturellement que partout où cela est possible des groupes locaux se créent et adhèrent à l'association nationale. Pour cela, il suffit d'un peu de bonne volonté de la part de membres isolés qui décident de devenir des espérantistes actifs. Songeons, par exemple, aux espérantistes habitant MATADI et diverses communes de KINSHASA, et qui pourraient facilement mettre sur pied un groupe local, surtout que dans quelques localités se trouvent parfois déjà plusieurs espérantistes qui malheureusement restent des isolés faute d'un tel groupe ou club.

Mentionnons encore que l'Institut Congolais d'Espéranto a, entre autres, comme but de faciliter les relations spirituelles et matérielles entre ses membres, sans tenir compte de la différence de tribu, de race, de nationalité, de religion, d'appartenance politique ou de langue. Cela signifie aussi que le respect des droits de l'homme est une condition essentielle pour la bonne marche de son travail.

* * * * *

PER ESPERANTO , IA HOMOJ IGAS UNU

Kiam mi aŭdis ke ekzistas lingvo internacia neŭtrala, mi ne komprenis ĝian uzon. Sed kiam mi legis multajn informaĵojn pri ĝi, mi ŝatis koni la lingvon bone. Hodiaŭ mi ekkomprenas kaj mi interesas min al ĝi. Vere, tiu lingvo ne estas por unu lando, sed por la tuta homaro. Ĉar kiam mi ĉeestas la Esperanto-kurson, kiam mi ĉeestas la kunvenojn de la Esperanto-Klubo, mi konatiĝas kun multaj novaj ideoj. Plie, mi ricevas ĉiutage leterojn, multajn gratulojn el multaj fremdaj landoj. Ili informas min pri preskaŭ ĉiam interesaj novaĵoj. Kiam mi legas tiujn leterojn, mi estas vere kontenta. Ŝajnas al mi esti preskaŭ konita en la tuta mondo.

Mi pensas ke per ilia laboro paca, helpe de Esperanto, post mallonga tempo, la homoj interkonatiĝos pli bone en la mondo. Se ĉiu homo dezirus lerni Esperanton kaj havus la saman ideon kaj bonan kompreneman volonton, la homaro iĝus unu ĉar per la Internacia Lingvo ĝi povus pli facile evolui al sama volonto, sama penso.-

David SALAMBI
Esperanto-Klubo
ST. JEAN. (Kinshasa)

AMIKAJ VORTOJ . . .

Karaj, kie ajn en la mondo ! Mi havas la plezuron informi vin ke ĉi tie en KINSHASA, ĉefurbo de la Demokrata Respubliko de Kongo, nuntempe okazas Esperanto-kursoj por ĉiuj junaj kaj maljunaj homoj kiuj ŝatas evolui sur monda kulturtereno. Ĝus finiĝis elementa kurso : ok novaj samideanoj obtenis la ateston post serioza ekzameno. En septembro startos nova instruado. Skribu al ni kaj ni respondos amike. Korespondado helpas nin perfektigi sed ankaŭ kreas fortan ponton inter Kongo kaj la aliaj landoj. Akceptu miajn korajn salutojn !

Louis NGINGI
Esperanto-Klubo
ST. JEAN. (Kinshasa)

- taŭga adreso por skribi :

ESPERANTO - KLUBO
rue Kasongo-Lunda, 249 ,
ST. JEAN. (Kinshasa) - KONGÓ -

Estis en vilaĝo Reĝo kun siaj regatoj. Iu tago, la junuloj ne plu volis aŭskulti la konsilojn de la maljunuloj ; ili forlasis la vilaĝon. Ili estis pluraj, el kiuj la filo de la Reĝo fariĝis juna Reĝo en alia vilaĝo konstruita. Ili konstruis sian novan vilaĝon malproksime de la malnova. Tie ili estis ĝoje-gaj ĉar ili ne plu estis kun la maljunuloj.

Iufoje, la juna Reĝo vidis pasantan bovidon kun belhara haŭto. Li diris al siaj amikoj ke li volus kaj ŝatus havi tian bovidhaŭton. Tuj liaj amikoj kuris post la bovido, kaptis kaj mortigis ĝin. Ili forprenis la haŭton kaj alportis ĝin tuj al la juna Reĝo, kiu estis tre kontenta pro tio. Li vestis sin rapide per la bovidhaŭto kaj rigardis gaje, tute kontenta kaj ĝoja. Kaj li pensis ke la suno jam ne povos ĝeni lin, kaj ke ankaŭ la malvarmo jam ne povos malvarmunigi lin. Li vere estis kaj aspektis kiel bela homo, belulo, vera Reĝo.

Post tri tagoj, li eksuferis, suferis, suferadis, ĉar la haŭto premadis lian korpon. Li ploradis multe kaj kriis : ho, miaj amikoj, ne plu eblas forpreni la haŭton, mi mortos, ho mia patro ! La junuloj aŭskultis kaj eksploradis : ho, nia Reĝo mortos ! Finfine la juna Reĝo forsendis siajn amikojn al la maljuna Reĝo : iru diri al mia patro ke mi suferadas ĉi tie, mi certe mortos !

Liaj amikoj foriris kaj alvenis en la malnova vilaĝo kie ili diris al la estro : Reĝa Moŝto, via filo mortos, li suferegas nun pro la bovidhaŭto kiu premadas lin forte ; antaŭe ĝi estis tutmola sed nun ĝi malmoliĝis kaj premadas la korpon de via filo.

Kian la patro, la Reĝa Moŝto, aŭdis la novaĵon, li ekridegis sed fine diris al la senditoj : iru ĉe mia filo kaj metu lin ĝis la ŝultroj en la akvo, poste vi vidos ke la haŭto denove fariĝos mola kaj tiam vi povos forpreni ĝin. Feliĉaj, la amikoj reiris al sia vilaĝo, ili faris tion kion la maljuna Reĝo al ili eksplikis kaj post mallonga tempo la juna Reĝo denove bonstatis, sen bovidhaŭto.

Kaj post kelkaj tagoj, la loĝantaro de la juna vilaĝo forlasis siajn kabanojn kaj reiris loĝi ĉe la gepatroj en la malnova vilaĝo, ĉar ili decidis ke junaj homoj ankoraŭ bezonas ofte la konsilojn de la maljunuloj.

La discorde entre les hommes ne cessera pas avant qu'ils s'accoutument à attribuer au vocable "homme" une plus grande valeur qu'aux vocables "peuple" ou "race". En chaque être humain je ne vois qu'un "homme". Je n'apprécie chaque homme que selon sa valeur personnelle et ses actes.

L.L. ZAMENHOF

*

L'Espéranto est neutre. Il ne connaît pas de nations fortes ou faibles, privilégiées ou inférieures. Personne ne s'humilie, personne ne se gêne. Tous, absolument égaux en droits sur un terrain neutre, nous nous sentons membres d'une seule nation : la famille humaine.

L.L. ZAMENHOF

*

DEZIRAS KORESPONDI . . .

- . Deziras interesanĝi poŝtmarkojn : S-ro Heinrich BENSE , Hauptstrasse, 3 , 6081 - ROTTERODE - Allemagne (DDR) - Eŭropo ;
- . Filatelisto, 22-jara : S-ro Wojciech KOZIEL , GDANSK-WRZEZCZ , ul. Manifestu Polanieckiego 6/3 - Pologne - Eŭropo ;
- . Interŝanĝas poŝtmarkojn, statuetojn, maskojn, ktp : S-ro Jiří NOVOTNY , BRNO - Leninova, 71 , Tchechoslovaquie - Eŭropo ;
- . Mi sendos belajn poŝtmarkojn ! Skribu al : S-ro Janusz KUREK , KATOWICE , ul. Sienkiewicza 6/5 - Pologne - Eŭropo ;
- . Skribu al mi ! Certe respondos pri ĉiuj temoj : S-ro Bruno SIEGERT , 851 - FURTH-BAY - Stiftungs-strasse 9 , Allemagne - Eŭropo ;
- . Skribu al studentino el Brazilo : F-ino Nadia Naira PACHECO DA SILVEIRA , Colégio Lara Vilela - San Domingos - NITEROI - Brasil - Sud-Ameriko ;
- . Deziras havi en la tuta mondo geamikojn : F-ino Monika RÜSCHLI , Maugwilerstrasse, 660, BRONSHOFEN 9552 - Suisse - Eŭropo ;
- . Mi estas studento kaj filatelisto, skribu tuj al : S-ro Dieter WATTKY , 83 PIRNA , Ludwig-Richterstrasse , 46 , Allemagne (DDR) - Eŭropo ;
- . Instruistino serĉas kongajn korespondantojn : S-ino Št. PANSKA , JIHLAVA, Tchechoslovaquie - Eŭropo ;
- . Serĉas korespondamikojn el Kongo : S-ro Salvador MORALES , Jordana , 24 , ZARAGOZA - Espagne - Eŭropo ;
- . Akceptu mian malproksiman saluton ! Skribu al : S-ro Panju STANĈEV , selo ĈELNIK - JAMBOLSKI - Bulgarie - Eŭropo ;
- . Deziras korespondi pri ĉiuj temoj : S-ro R. MOERBEEK , Kloppenburgstr.12, EMMELOORD - Pays-Bas - Eŭropo ;
- . Volonte korespondos : S-ro D.W. HOFFMAN , 1444 Leslie Street, HILLSIDE, N.J. - U.S.A. ;
- . Ŝatas korespondi kun konga esperantisto : F-ino Florence CÔTÉ , 1370 FRONTENAC , QUEBEC 6 , P.Q. - Canada - Ameriko ;

* * * * *

K.E.I. - komunikoj . . .

- Samideano TOKO, ĝisnuna prezidanto de K.E.I. eksiĝis pro daŭra malsano. Kaŭze de tiu situacio, nova provizora nacia komitato estis elektita dum ĝenerala kunveno kiu okazis la 8-an de majo 1966. Ni forte esperas ke S-ano TOKO baldaŭ resaniĝos por povi aktive partopreni la kongran Esperanto-movadon.
- St.JEAN.(Kinshasa) : post ekzameno, ok lernantoj obtenis la ateston pri elementa Esperanto-studado.(10/7/66)
- Pere de S-ro Joel VILKKI (Finlando) ok kongraj esperantistoj fariĝis individuaj membroj de U.E.A. Koran dankon al la finlandaj donacintoj !
- Kiel antaŭvidite ne okazis nia Esperanto-kongreso dum Pentekosto 1966 - sed ŝajnas ke la venonta jaro estos pli favora por organizi la 1-an kongreson. Esperu ni !
- K.E.I. sendis al Normala Lernejo n° 4 en RAFAELA (Argentino) 22 desegnaĵojn de kongraj infanoj por ekspozicio.
- Ankaŭ subskribis la proponon favore al Esperanto por U.N. la Federacio de la Agrokulturaĵaj Skoltoj de Kongo (neŭtrala organizo). Notinde estas ke la oficialaj laborlingvoj de tiu organizo estas la franca kaj Esperanto. Eventuale skribu al : F.E.A.C.O. (Fédération des Eclaireurs Agricoles du Congo), B.P. 1 , KINSHASA 8 - Kongo.
- Ni ricevis la ĝojigan novaĵon pri starigo de "AFRIKA ESPERANTISTA GRUPO EN BELIGUJO". Ĝia membraro konsistas el kongraj studentoj kiuj sekvis Esperanto-kurson en Bruselo. Prezidanto estas S-ro MPOY. Ĉiuj membroj estas individuaj membroj de U.E.A. Pluraj membroj de tiu juna grupo partoprenis jam kelkajn kongresojn : kongreso de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj (dum monato de marto) kaj la kongreso de la Belga Esperanto-Federacio dum Pentekosto 1966. Dum tiu lasta, la grupo ricevis premion de 500 belgaj frankoj. La grupo, pere de S-ro DE SMEDT (Esperanto-profesoro), petis sian aliĝon al K.E.I. Ni esperas ke tio baldaŭ realiĝos kaj ke la kontakto fariĝos pli rekta kaj la kunlaboro fruktedona.
- Nia aktiva membro, S-ro TIONGO, forlasis KINSHASA kaj nuntempe loĝas en MATADI. Sekve de tio, la posteno de Vic-Delegito por Kinshasa vakas, kaj S-ro TIONGO fariĝas Delegito de U.E.A. por MATADI.(adreso : Avenue des Camions, 1, Kitomesa/MATADI (Kongo Central).

K A R A J A M I K O J K I E A J N E N K O N G O , K I E
A J N E N A F R I K O , K I E A J N E N L A M O N D O :
S E N D U A L N I A R T I K O L O J N , R A P O R T O J N ,
I N T E R E S A J N N O V A Ĵ O J N . . . T I E L M A N I E R E
L A R E V U O F A R I Ĝ O S P L I I N T E R E S A , P L I
A M P L E K S A ! . . .